

Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2016

Jarkolekto 3 - Numero 1



ENHAVOTABELO

de januaro 2016

Titolpaĝo	1
Enhavotabelo	2
De ni por ... ni	3
Moneroj & medaloj	4

Unuflankaj medaloj

L.L. Zamenhof (1859 – 1917)

Milda Jakubcová (1899-1979)

Andreo Cseh (1895-1979)

Lakshmiswar Sinha (1905-1977)

Medalonoj

Latva medalono “Ekologio kaj Folkloro”

Zamenhof – medalono

Aspektoj de numismatiko	10
Spikumaĵoj kaj suplementoj	12
Medalistoj: 5. Józef Gosławski (1908 - 1963).....	13
Historiaj aspektoj: Pioniro de eŭro.....	15
Terminaro: alfabeto listo (5)	17
Retpoŝto	18
Anoncoj & Eventoj	24

Tajpado +paĝaranĝo: Vivienne Tudts

Provlegado: Jozefo Horvath

Kunlaborantaj redaktoroj: VI

Finredaktoro: Bert Boon

De ni por ...ni!

Saluton al vi ĉiuj, karaj ENA-membroj kaj aliaj legantoj!

Komence de la 3a jarkolekto de “*Esperanta Numismatiko*”, ni tutkore dankas vin ĉiujn pro via lojaleco koncerne ENA-n. Neniu el vi, post du jarkolektoj, petis nin nuligi la membrecon kaj ne plu sendi la revuon. Ni do kuraĝas tion interpreti kiel instigon al daŭrigo kaj plibonigo de nia prinumismatika kalejdoskopo.

Ni krome deziras danki ĉiujn kiuj jam kunhelpis kaj kunlaboris iel por realigi la pasintajn ok numerojn de la du lastaj jarkolektoj. Jam tro longa listo por nomi ĉiujn helpintojn!

Tamen ni volas nun jam unuope raporti pri la aktuala helpantaro. Nia kara membro el Hungario sinjorino Adrienne Pasztor sukcese petis sian konatulon sinjoro Jozefo Horvath, kunlabori kiel unua provleganto de ENA-revuo. Ni kompreneble tutkore dankas ilin ambaŭ!

Samtempe ni emfazas nian dankon al la kuracistaj geedzoj Ludoviko Molnar kaj Julinjo Farkas kiuj kunlaboris por ENA, petantaj foton de la fama bulgara samideano Nikola Aleksiev al sia konatulo, sinjoro Johano Ruff. Vidu ankaŭ la rubrikon “Spikumaĵoj kaj Suplementoj”.

Ni ankaŭ dankeme atentigas vin pri la tre interesa letero - en la sama rubriko - de nia membro Martin Purdy el Nov-Zelando pri la spesmilaj monbiletoj kiujn ni montris en la 4a numero de la antaŭa jarkolekto, sur p. 15-16. Vere pravaj rimarkoj!

Lasu nin nun iom informi vin pri la nova numero mem. Unue ni pritraktas novan medaltipon, nome kelkajn el la multaj unuflankaj medaloj de J. Strupulis, la fama medalisto el Latvio.

Sekve vi povas legi pri eksterordinara Esperanto-pioniro kiu estis fervora probatalanto de Eŭropa Unio kun i.a. komuna valuto kaj eŭropa, komuna, neŭtrala helplingo.

Ni krome pentras portreton de elstara medalisto el Pollando, kiu kreis belegan Esperanto-medalon, kiun ni baldaŭ priskribos en unu el la venontaj numeroj.

En la rubriko “Aspektoj de numismatiko” ni prezentas sinoptikon pri metaloj kaj alojoj kiuj estis aŭ estas uzataj por krei medalojn aŭ monerojn.

Esperante ke en 2016 la nombro de kunhelpantoj kaj tiu de novaj membroj dise en la mondo kreskados, ni deziras al nia legantaro agrablan kaj instruan legadon!


Nia reta poŝtkesto pacience kaj scivoleme atendos viajn salutojn, reagojn, kritikojn, ideojn, kontribuadojn ktp.!

Bert

MONEROJ & MEDALOJ

Tipo D1 – Unuflankaj medaloj

L.L. Zamenhof (1859 – 1917)



Lando: Latvio

Kvanto: nekonata

Metalo: bronzo

Pezo: nekonata

Diametro: 91 mm

Medalisto: Jānis Strupulis

Jaro: 1976

Averso:

Busto de Zamenhof kaj skribo: “AŬTORO DE ESPERANTO D-RO L.L. ZAMENHOF .
1859-1917” kaj skulptista sigelo + jaro

Rimarko 1:

Informojn pri J. Strupulis vi trovas en jarkolekto 1 numero 4, p. 9

Rimarko 2:

“Krom granda nombro da medaloj sen Esperanto-motivoj, dum la jaroj 1976-1989 la elstara skulptiso Jānis Strupulis faris ankaŭ 17 medalojn, per kiuj li memorigis pri Esperanto en Latvio kaj eksterlandaj esperantistoj, kiuj aktivis en Latvio. J.S. ankaŭ faris kelkajn medalojn por “Radio Polonia”, kiuj estas notataj sub Pollando. Ĉiuj medaloj notataj estas faritaj el bronzo en negranda nombro; de kelkaj ekzistas ankaŭ kopioj el argilo. Ili estas faritaj en pli granda nombro. La medaloj de J.S. surhavas lian sigelon kaj ofte ankaŭ la jaron kiam la medalo estis kreita.” (el Hans Jankowski: “Esperanto-Medaloj 1912-1995” p.14)

Tipo D1 – Unuflankaj medaloj

Milda Jakubcová (1899-1979)



Lando: Latvio

Kvanto: nekonata

Metalo: bronzo

Pezo: nekonata

Diametro: 58 mm

Medalisto: Jānis Strupulis

Jaro: 1989

Averso:

Busto de Milda Jakubcová kaj skribo:

“ESPERANTO-POETINO MILDA JAKUBCOVÁ 1899-1979” kaj skulptista sigelo

Rimarko 1:

Milda Pirksts estis latva Esperanto-poetino, kiu foriris el Latvio al Ĉeĥoslovakio (Brno) kaj edziniĝis al sia ĉeĥa korespondanto František Jakubec.

Post 1945 ŝi fondis kaj estris Esperanto-rondeton en Brno.

Milda multe tradukis el la latva literaturo.

Ŝiaj originalaj versoj pri bestoj aperis en 1970 sub la titolo: “Estrado de animaloj”.

Rimarko 2:

Pliajn informojn pri la poetino: Interreto / Google / Vikipedio

Tipo D1 – Unuflankaj medaloj

Andreo Cseh (1895-1979)



Lando: Latvio

Kvanto: nekonata

Metalo: bronzo

Pezo: nekonata

Diametro: 67 mm

Medalisto: Jānis Strupulis

Jaro: 1989

Averso:

Busto de Andreo Cseh kaj skribo: “

“ANDREO CSEH 1895-1979” kaj skulptista sigelo + jaro 89

Rimarko 1:

Dum la jaroj 1927-1930 Cseh faris prelegvojaĝojn en Latvio.

Rimarko 2:

Andreo (András) Cseh estis rumania hungaro kaj katolika pastro, kiu famiĝis pro sia originala, tre sukcesa rekta metodo por instrui Esperanton: la “Cseh-metodo”.

Rimarko 3:

Ege rekomendinda estas la biografio far la nederlanda samideano kaj iama amiko de Cseh, sinjoro Ed Borsboom: “*Vivo de Andreo Cseh*”, eldonita en 2003 de “Internacia Esperanto-Instituto”.



Tipo D1 – Unuflankaj medaloj

Lakshmiswar Sinha (1905-1977)



Lando: Latvio

Kvanto: nekonata

Metalo: bronzo

Pezo: nekonata

Mezuroj: 73 mm x 62 mm

Medalisto: Jānis Strupulis

Jaro: 1989

Averso:

Busto de L. Sinha kaj sub ĝi lia subskribo en la hinda.

Dekstre, vertikala surskribo:

“LAKSHMISWAR SINHA
1905-1977”

Krome: la sigelo de J. Strupulis kun la jaro 89

Rimarko 1:

Nia hinda samideano en 1930 vizitis Latvion kaj gvidis Esperanto-kursojn.

Rimarko 2:

La aldonita portreto sur poŝtkarto inspiris tre probable la medaliston.



Tipo D2 – (Unuflankaj) (mur)medalonoj

Latva medalono “Ekologio kaj Folkloro”



Lando: Latvio

Kvanto: nekonata

Metalo: bronzo

Pezo: nekonata

Jaro: 2002

Medalisto: nekonata

Diametro: 131 mm (disko)

154 mm (tuto)

Averso:

Bildo de (parto de) tri preĝejoj en la ĉefurbo Riga kaj surskriboj:

Ĉirkaŭe: “12.a INTERNACIA ESPERANTO – KONGRESO”

Sube: “RIGA 1-7 JULIO 2002”

Horizontale: “EKOLOGIO KAJ FOLKLORO”

Rimarko:

Plena Ilustrita Vortaro difinas “medalono”-n tiel: “rondforma aŭ ovala bareliefo kun figuraĵo” (vidu ankaŭ “Terminaro” p.17; kaj komparu kun “medaliono”!)

Tipo D2 – (Unuflankaj) (mur)medalonoj

Zamenhof - medalono



Lando: Nederlando (UEA)

Metalo: bronzo

Jaro: nekonata

Diametro: 131 mm (disko)
154 mm (tuto)

Kvanto: nekonata

Medalisto: nekonata

Pezo: dekstra: 200 gr
maldekstra: nekonata

Averso:

Busto de Zamenhof, rigardanta maldekstren kaj skribo:
“LUDOVIKO . ZAMENHOF . 1859-1917

Rimarko:

De post 1987 UEA vendas diversajn “muromedalojn” (= medalonojn). Ili estas eniĉigitaj en ligna kadro kun pendoŝnuro. La metala parto estas lada, bronza disko. Ili montras ilustraĵon sur nur unu flanko.

[Kun danko al sinjoro Martin Purdy, kiu sendis la du pli grandajn medalonojn kun informoj!](#)

Kelkaj metaloj kaj alojoj



oro



arĝento



bronzo



Kupro (+nikelo)



aluminio



zinko



terre cuite(terakoto)



porcelano



vitro

[Kun danko al la eminenta belga numismato Luc Vandamme](#)

ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

Pormedalaj metaloj kaj alojoj

Oro: Au

Arĝento: Ag

Perfajra orumita arĝento: Agu

Nova arĝento: 55-60% Cu + 19-31% Zn + 12-26% Ni

Alpako: arĝentumita nova arĝento

Kupro: Cu

Medalbronzoj: Ae 93% Cu + 7% Sn

Florenca bronzoj: Ae Flor 85% Cu + 15% Sn

Orumita bronzoj: Aeu

Arĝentumita bronzoj: Aeg

Kupra monermetalo 95% Cu + 1% Zn + 4% Sn

Kupra sonorilmetalo 80% Cu + 20% Sn

Alumina bronzoj 90-95% Cu + 5-10% Al

Latuno 65-70% Cu + 30-35% Zn

Tombako 82-92% Cu + 8-18% Zn

Manganino 86% Cu + 12% Mn + 2% Ni

Konstantano 60% Cu + 40% Ni

Menelo 30% Cu + 70% Ni

Stano: Sn

Aluminio: Al

Plombo: Pb

Zinko: Zn

Blanka metaloj: Bm

Zamako: Za Zn + (Al/Cu/Mg)

Mangano: Mn

Cloisonné-emajlo: Cl

Nikelo: Ni

KROME estas uzataj: vitro, porcelano, terakoto (argilo!)

Fonto: Gabriël Stautemas: "Wat je moet weten over KUNSTMEDAILLES" ("Kion oni sciu pri ARTMEDALOJ")

SPIKUMAĴOJ KAJ SUPLEMENTOJ

Nia membro, s-ro Martin Purdy el Nov-Zelando prave atentigis min ke li en 2013 (antaŭ la komenco de la revuo) sendis al mi leteron pri kelkaj strangaĵoj koncerne la spesmilajn monbiletojn (vidu Jrk2, n-ro4, p.15). Mi zorge konservis ĝin kaj poste ... forgesis ĝin!

Mi do senkulpigas kaj denove dankas Martin, kiu sendube tre atente legas la artikolojn. Mi ege ĝojas pri lia atentigo!

Pri la "biletoj" de la Universala Spesmila Banko, eble estus interese al legantoj publikigi detalojn el nia korespondado de novembro 2013 (kopiita ĉi-malsupre), por sciigi, ke ŝajne ekzistas (tromp-) kopioj de la biletoj, ĉar estas al mi strange, ke la serioj, pri kiuj ni scias, havas la samajn numerojn, kaj ke la grandeco iom malasamas:

"Mi detale pristudis la kopiojn de la spesmilaj monbiletoj kaj mi konstatas, ke la biletoj kiujn montras Hans Jankowski sur la dorsa flanko de sia broŝuro "Esperanto-mono" de 2000 havas la samajn numerojn kiel la ekzempleroj kiujn li antaŭ longe sendis al mi el Germanio (ni havis maloftan korespondadon). La numeroj estas: (serio AA)> 228 (por 1/2 S kaj 2 S) kaj 202, 203 (respektive por 5 S kaj 10 S). En lia letero li menciis ke la miaj estas kopioj, sed ne ĉu la liaj estas originalaj aŭ ne."

Nun mi citos por vi el la sama broŝuro, pj.12-13:

"La Universala Spesmila Banko kun sidejo en Laren (Nederlando) eldonis monbiletojn en valoro de 1/2, 1, 2, 5 kaj 10 spesmiloj. La originala grandeco de la monbiletoj estas 103x 73 mm. (!!! miaj kopioj mezuras 113x 78 !!!). Sur la monbiletoj la preskoloro estas nigra por valorindiko, dato, numerado kaj subskriboj. La aliaj preskoloroj estas: ruĝa por duonspesmilo (ankoraŭ nekonata, supozeble blua por unu spesmilo), verda por du spesmiloj, bruna por kvin spesmiloj kaj viola por dek spesmiloj. Subskriboj de Dreves Uitterdijk kaj Jan Hengel. Tiuj biletoj ankaŭ ekzistas kun alikolora vertikala surpriso *S e n v a l o r a S p e c i m e - n o*.

La dorsaj flankoj de la biletoj estas presitaj en sama koloro kiel la frontpaĝoj, sed sen nigra koloro. Ili montras la pacpalacon en Hago, Holando, kaj je la flankoj la surskribon: Dek spesmiloj egalvaloraj al 8 gramoj da oro laŭ la proporcio de 11 al 12/ ĉiuj rajtoj rezervitaj- falsado leĝe punota."


Jen do kion mi povas sciigi al vi nuntempe kaj kio iam certe ankaŭ estos unu el la temoj de nia ENA-revu(et)o.

En mia venonta letero mi certe povos havigi al vi ankaŭ informojn pri la t.n. "ĉekoj".

Esperante ke miaj informoj estos sufiĉe valoraj por vi, mi salutas vin.

Sincere, Martin"


➤ *Nikola Aleksiev*



Ni kore dankas sinjorojn Ludoviko Molnar kaj Johano Ruff, kiu, kunlaborante post nia peto kun doktoro Molnar, havigis al nia redakcio ne nur foton (kun aŭtografo!) de la elstara bulgara samideano Nikola Alexiev (vidu jkl 2, n-ro4), sed ankaŭ klarigon pri la majstrosigno (laŭ sinjoro Ruff) CY de la medalisto Tibor Csiky

MEDALISTOJ

5. Józef Gosławski (1908 - 1963)



Józef Gosławski (naskiĝis la 24-an de aprilo 1908 en Polanówka, mortis la 23-a de januaro 1963 en Varsovio) estis pola skulptisto kaj medalfaristo. Projektanto de moneroj (interalie 5 zlotoj kun bildo de fiŝkaptisto), monumentoj (interalie de Fryderyk Chopin en Żelazowa Wola) kaj medaloj (interalie la *Jaro 1939*). Premiito de pluraj artkonkursoj; distingita interalie per la Arĝenta Kruco de Merito.

Lia artista edukado komenciĝis en la fama instituto de Jan Koszczyc-Witkiewicz en Kazimierz Dolny. Post la lernejoj li sukcesis en ekzameno por “Akademio de l’ Belaj Artoj” en Krakovo, sed li tiam estis ankoraŭ tro juna. Do, li daŭrigis la studadon en “Nacia Ornamenta kaj Artista Industria Lernejo” en Krakovo.

Fine en 1932 li ekstudis en “Akademio de l’ Belaj Artoj” en Krakovo kaj daŭrigis la kapabligon en Varsovio. Sekve li ricevis stipendion por studi en Romo. Dum la nazia okupado li denove loĝis en Pollando.

Ekde 1947 li laboris kiel Estro de “Medala kaj Metala Skulpturo” en “Nacia Artista Instituto” en Poznań.

En 1956 la familio (du filinoj kaj la edzino Wanda Mankin, kiu estis unu el liaj gelernintoj) transloĝiĝis al Varsovio.

Neatendite li mortis en la ĉefurbo en 1963, je la aŭroro de nova fazo en sia artista kariero.

Fontoj: Vikipedio kaj Wikipedia



HISTORIAJ ASPEKTOJ

Pioniro de eŭro

A Enkonduko

Ekde numero 1 de la 2a Jarkolekto ni skizis kaj ilustris diversajn aspektojn de la intenco de esperantaj pioniroj krei universalan monunuon. Ni jam konstatis, ke la spasmila sistemo, komence esperplene sukcesa, ĉefe pro la katastrofaj konsekvencoj de la milito 1914-1918 fine fiaskis.

En ĉi kontrubuaĵo ni volas prilumi la nomon kaj la ideojn de eksterordinara viro, vere viziulo pri la estonteco de Eŭropo.

B Josef Zauner (1895-1959) (pseŭdonimo: J. Dŭa)

Tiu samideano estis rumania-germana instruisto kaj librovendisto. Zauner estis la unua persono kiu vere subtenis la ideon de eŭropa komuna mono, do pioniro de la nuntempa eŭro.

Li fondis la UŜE-eldonejon en Leipzig (orienta Germanio) kaj ekde 1921 li estis probatalanto de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo.

Li verkis kaj germane kaj esperante. Kelkaj libroj: “La elvojo UŜE” (1923), “La vojo al Eŭropa Partio” kaj en 1931 “L’ eŭropanismo”.


La ĉefaj konsideroj en lia UŜE-programo pri komunaj aranĝoj por la eŭropaj landoj estis:

- **Komuna monsystemo**
- Komuna armeo
- Komuna vojimposto
- Komuna poreksterlanda strategio
- Komuna oficiala eŭropa lingvo (Esperanto)

Por realigi komunan eŭropan valuton (tiam ekzistis 20 diversaj!) oni devus trovi komunajn politikajn konsentojn. Por ke komunaj komerco kaj politiko estu efikaj, oni devus akcepti komunan monunuon. Necesus ankaŭ fondi Eŭropan Centran Bankon (banko por internaciaj pagoj).

Krome, ĉirkaŭ la jaro 1930 Zauner dissendis poŝtkartojn, per kiuj li esperantlingve instigis la loĝantojn de Eŭropo postuli ne nur komunan eŭropan ekonomian zonon kaj eŭropan parlamenton, sed krome komunan eŭropan pagilon.

La kopio ĉi sube montras ekzempleron stampita en 1934.



La ideo de Zauner pri komuna eŭropa monunuo estas nuntempe kvazaŭ realigita. Bedaŭrinde ankoraŭ mankas la realigo de komuna neŭtrala lingvo.

Fontoj: "Enciklopedio de Esperanto", Budapeŝto 1933, p.96-97, 224, 499

TERMINARO

Alfabeta listo (5):

alfenido: alojo el kupro, zinko, nikelo kaj kun 20% da arĝento.

arĝentano: alojo el kupro, nikelo kaj zinko, imitanta arĝenton (arĝentumo).

argilo: sedimenta aŭ rezidua petro tre etgrajna, ofte en formo de glueca, knedebla tero, konsistanta el aŭ precipe el argilaj mineraloj.

“Medaloj el argilo estis kreitaj en kelkaj ŝtatoj de Sovet-Unio dum periodo 1970-1992; tiam tie la esperantista vivo reaktiviĝis, sed mankis metaloj por fari medalojn” (el “Esperanto-Medaloj 1912-1995” p.1 de Hans Jankowski).



Argila Esperanto-medalo el 1930 (manko de metaloj!)

medalono: rondforma aŭ ovala bareliefo kun figuraĵo.

medaliono: juvelo en formo de plata malfermebla skatoleto, kiun oni ordinare portas per ĉeno ĉe la kolo kaj en kiu oni konservas portreton, harojn kc.

medalo: metala disketo, surhavanta ambaŭflanke bildon, signojn aŭ surskribojn, stampita aŭ fandita kiel memoraĵo pri grava okazintaĵo aŭ kiel honoraĵo al merita homo.

medalstampo: se oni prenas inter la dikfingro kaj montrofingro moneron aŭ medalon kun la ilustraĵo rekte antaŭ si kaj sekve turnas la objekton ĉirkaŭ la vertikala akso, la antaŭe dorsa flanko staras rekte.

monerstampo: se oni prenas inter la dikfingro kaj montrofingro moneron aŭ medalon kun la ilustraĵo rekte antaŭ si kaj sekve turnas la objekton ĉirkaŭ la vertikala akso, la antaŭe dorsa flanko staras fundalsupre.

muromedalono: medalono kun pendigilo.

nikelaĵo: monero el nikelino.

nikelino: alojo el kupro, nikelo kaj zinko.

nikelo: metalo grizete blanka, brila, tre malmola.

noĉrando: krenela rando (ekz. en monero).

unoflanka medalo: medalo kies reverso montras nenion.

RETPOŜTO

de vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

19.10.2015 4:26 PM

Karaj Ludoviko & Julianna,

Saluton! Mi esperas kaj samtempe deziras ke vi ambaŭ fartas bone. Mi regule, kara Ludoviko, legas viajn leterojn al la UMEA-anoj.

Mi ankaŭ skribas nun, ĉar mi (denove!) bezonas vian helpon, ne pro mia sanstato, sed por mia kara "infano", la revuo de ENA.

En la lasta numero de ĉi-jaro i.a. medalo el Hungario staros en la fokuso. En 1966 dum la UK en Budapeŝto estis enmanigita belega honora medalo al nia bulgara samideano Nikola Aleksiev, fama esperantisto.

Ĝis nun mi vane serĉis foton de li. Nun, mi esperas ke vi povus trovi kaj sendi foton, eventuale desegnon kiu montras lin.

Krome mi observs sur la medalo la inicialojn CY, verŝajne por la nomo de la medalisto. Ĉu vi eble memoras pri lia nomo? Mi supozas ke vi partoprenis en tiu UK. Mi scias, ke estas longa tempo de 1966 ĝis nun. Sed, eble vi povus trovi ĝin.

Mi nur esperas ke mi ne vane serĉigas vin, do mi deziras sukceson.

Evidente mi jam anticipu dankas vin, eĉ se la rezulto estus negativa.

Kun koraj salutoj al vi ambaŭ.

Amike, Bert

21.10.2015 13:23 GMT+02:00 <ludoviko@t-online.hu>:

Kedves Barátaim!

Az alábbi kérdés érkezett hozzánk.

1. Rendelkezik-e valaki **Nikola Aleksiev** képével, vagy róla készült rajzzal?

2. Melyik éremművész nevét rejtik a **CY** betűk az érmen?

Örülnék, ha valaki tudna válaszolni.

Baráti üdvözlettel

Molnár Lajos

PS.: Bert Boon az ENA Revuo (Esperantista Numismatika Asocio folyóirata) szerkesztője.

21.10.2015 3:23 PM

Kara Ludoviko !

Bedaŭrinde, anstataŭ helpi mi povas sendi nur ideon. La CY literoj ne estas (laŭ mi) inicialoj sed majstrosignoj. Ili supozeble signas la skulptiston kaj medaliston Tibor Csiky (1932-89). Nature, mi nur supozas. Trarigardante la bildojn pri liaj verkoj interrete mi trovis unusolan similecon kun la de vi sendita medalo. Nome: sur la verkoj, pli bone dirite, sur la videbla surfaco de la verkoj nenie estas videbla majstrosigno, same kiel sur la medalo.

Cetere, mi iĝis esperantisto en 1966, do mi povus nenimaniere helpi.

Saluton kaj plej bonajn bondezirojn J. Ruff

23.10.2015 12:14

Kara Bert!

Kaj nun pri la medalo, kiun ricevis **Nikola Aleksiev**.

Sube Vi trovos la mesaĝon de János (Johano) Ruff. Li estis la unua, kiu menciis la nomon de la medalisto Tibor Csiky.

Tre verŝajne el la unua kaj lasta literoj de lia familia nomo devenas la mallongigo **CY**.

Bedaŭrinde, la plimulto de la tiamaj organizantoj de la UK jam ne vivas, aŭ eĉ se ili vivas, ili ne estas membroj de la diskutlistoj.

Eble la Bulgara Esperanto-Asocio (ĉefdelegito: Georgi Mihalkov modest@abv.bg ; estraro: bea@esperanto.abv.bg) povus sendi al Vi la foton de Nikola Aleksiev.

Esperante, ke ni povis iomete helpi, elkore, plej amike kaj tre dankeme salutas Vin Ludoviko kaj Julinjo

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

21.10.2015 21:29

Estimata sinjoro Baláž, kara Petro,

La fermo de la UK 2015, en la salono Zamenhof, estis vere apoteozo, ne nur por la partoprenantaro, sed certe por vi kaj via fianĉino. Gratulojn por vi ambaŭ!

Reveninte hejme, mi fine trovis tempon por legi la broŝurojn pri Nitra kaj pri la venonta Kongreso. Okulfrapis min la informo, ke "la slovakia poŝto preparas specialan eldonadon de poŝtmarkoj". Mi tuj entuziasmiĝis por la filatelistoj kaj ege por mia filatelista amikino, prezidantino de ELF-AREK, Elda Doerfler. *Samtempe mi tuj bedaŭris ke DENOVE ne aperos memora medalo pri tia grava evento...*

Antaŭ 2013 neniu petis al la tiama LKK ne forgesi la numismatojn kaj eldoni ankaŭ memoran medalon. Sed poste la situacio ŝanĝiĝis.

En 2012 mi prenis la iniciativon fondi (verŝajne por la unua fojo en la historio de Esperanto) fakgrupon pri esperanta numismatiko. La nova fakgrupo (vidu ankaŭ la Jarlibrojn 2013, 2014 kaj 2015), Esperanto-Numismatika Asocio (ENA), havas propran revuon ("Esperanta Numismatiko") kaj sendas ĝin kvarfoje en unu jaro al 42 membroj en ĉiuj kontinentoj kaj al 15 esperantaj asocioj, muzeoj kaj bibliotekoj dise en la mondo.

En la nomo de tiuj membroj kaj de ĉiuj venontaj membroj mi petas konsideri la eblecon eldoni memoran medalon, ekzemple parte kun esperanta, parte kun slovaka teksto. Tiel vi celas pli grandan publikon, eĉ slovakojn (kaj aliajn) kaj ne-esperantistojn.

Vi ne timu pri la vendado, se la medalo estos sufiĉe bela! Kial ne je unu flanko la urbodomo de Nitra aŭ alia valora konstruaĵo, je la alia flanko busto de Zamenhof? Krome, ĝi devas esti pagebla ankaŭ por la maldikaj monunuoj. Garantio certe estas, al la interesiĝantoj mendigi la medalon kaj pagigi anticipe, al via konto. Por la UK mem vi povus decidi pri la eldonkvanto laŭ la sukceso da la perreta vendo. Retaj adresoj por propagandi certe ne mankas al vi, ĉu?

Kiel numismato mi scias ke en Slovakio estis famegaj medalistoj-skulptistoj kiel Stefan Schwartz kaj Ladislav Snopek, krome ankaŭ nun ekzistas famuloj kiel Miroslav Hric. Tamen mi estas certa, ke en (la regiono de) Nitra estas tre lertaj medalistoj, eble malpli famaj nuntempe, kiuj petas multe malpli da mono ol la famuloj. Kredu min, multajn jarojn poste la medalo restos la plej brila elpendaĵo de la 101a Universala Kongreso!

Mi povas aldoni ke mi mem mendos minimume 3 ekzemplerojn kaj ke mi propagandos en esperantistaj rondoj en Belgio kaj anoncos la eventon en diversaj revuoj, unuavice en la revuo de la ENA-anoj.

Por montri al vi la belecon de UK-medaloj, mi aldone sendas bildojn de UK-medalojn el la jaroj 1928 (Antverpeno/ Belgio); 1978 (Varna/ Bulgario); 1990 (Havana/ Kubo) kaj 2009 (Bjalistoko/ Pollando).

Altestime kaj samideane,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Kelkaj UK-medaloj



22.10.2015 13:47

Bonege, kara amiko! Gratulegojn pro via iniciato sendi tiun ĉi mesaĝon al Baláž! Ĝi estas tre bone skribita.

Hodiaŭ atingis min bela surprizo el Belgio: sur broŝuro la antverpena pm-o. Vi divenis: tiu ankoraŭ ne estis en mia kolektaĵo, tial tiom pli dankata vi estu!

Dankon pro via helpserĉado por kompletigi per mankantaj eroj mian liston.

Morgaŭ mi trajnos al Torino, por viziti la familion de mia filo kaj revenos je la 29a de oktobro.

Plej karajn salutojn al vi kaj via Vivi

Elda (kaj edzo)

☆☆☆☆☆☆☆☆

07.11.2015 7:47 PM

Kara Bert,

eble vi jam konas kaj la moneron kaj tiun paĝon:



<https://www.facebook.com/184506935071303/photos/a.184737078381622.1073741829.184506935071303/431405243714803/?type=3&permPage=1>

Mi tamen sendas la informon kun saluto

Utho

07.11. 2015 20:01

Kara Utho,

Jes, mi konas ĝin kaj intencas priskribi ĝin en la tria jarkolekto.

Tamen mi ege dankas vin pro la informo. Neniam hezitu, ĉar al mi plaĉas la kunlaboro de niaj membroj.

Mi salutas vin, kara kunredaktoro, kaj esperas iam denove ricevi aliajn informojn!

Tutkore,
Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆

12.11.2015 4:33

Kara amiko,

Hieraŭ mi akiris du novajn e-numismatikaĵojn - bronzan medalon el la 72-a UK in Varsovio kaj "medalecan" murornamaĵon el la 12-a IEK in Rigo, Latvio, en 2002. Ĉiuj bildoj k detaloj estas ĉi-tie:

<https://www.flickr.com/gp/127894290@N07/9vT971>

Mi serĉis en la antaŭaj numeroj de ENA kaj ne trovis ilin, do mi imagas, ke ili estas novaj "malkovraĵoj".

Sincere,

Martin
NZ

12.11.2015 16:19

Kara Martin,

Mi ege dankas vin pro la tre interesaj ne jam aperintaj numismatikaĵoj, kiujn vi sendis. Mi povas malfermi sed bedaŭrinde mi ne sukcesas kopii ilin por la revuo de ENA. Probable mi ne havas la taŭgan programon.

Ĉu eblus denove sendi ilin ekzemple per Word aŭ PDF?

Jen mia peto, sed mi ankaŭ havas demandon. Normale murmedalonoj estas unuflankaj. La bildoj tamen montras du tiajn medalonojn. Ĉu temas pri averso + reverso aŭ du unuopaj numismatikaĵoj?

Mi ege dankas vin kaj salutas

tutamike,

Bert

12.11.2015 18:55

Kara Bert,

Dankon por via respondo. Vi ne bezonas specialan programon - nur alklaku ĉiun unuopan bildon, kaj vi vidos la priskribon pri ĉiu medal(flank)o (rulumu la ekranon supren, se necese). Vi ankaŭ povas elŝuti la dosierojn klakante sur la "malsupren"-sago en la malsupra dekstra parto de la bildo (vidu la imagon, kiun mi alkroĉis al ĉi tiu mesaĝo kaj sekvu la ruĝan sagon, kiun mi aldonis). Ankaŭ estas eble, aldoni la proprajn komentojn, ktp ...

Vi vidos, ke la du "flankoj" de la murornamaĵo havas iomete malsamajn diametrojn, do temas pri du apartaj objektoj. Mi nur konjektas laŭ stilsimilecoj, ke ili apartenas al la sama evento.

Sincere,

Martin

14.11.2015 17:09

Kara Martin,

Dankon ke vi gvidis nin tra la "labirinto". Ni sukcesis kopii la fotojn por la revuo. Sendube la murmedalonoj ricevos lokon en la venonta numero (jrk 3, n-ro 1) kaj la pola medalo tre verŝajne en n-ro 2.

Ĉu mi rajtus ankaŭ peti kelkajn informojn pri la mezuroj, pezo de la murmedalonoj?
Anticipan dankon!

Mi ĝojas pri viaj kontribuajoj kaj ege dankas vin, esperante ke multaj aliaj membroj agos sammaniere kiam ili havos la okazon kaj la eblecon.

Kun koraj kaj amikaj salutoj,

Bert



A N O N C O J

&

E V E N T O J

B I T O T E K O

Se vi hazarde aŭ akcidente forviŝis kompletan numeron de “Esperanta Numismatiko”, vi tutsimple serĉu en Google por trovi la kompletajn jarkolektojn de nia revuo.

Agu tiel:

Google

Skribu en Google: bitoteko.esperanto.es:8080/jspui/handle/11013/7

Klaku: [Bitoteko - Federación Española de Esperanto](#)

Vi ricevos: **Bonvenon al Bitoteko!**

[Jen la bitoteko de Hispana Esperanto-Federacio](#)

[Gazetoteko · Hemeroteca Ĉefpaĝo de la sekcio](#)



Iru suben kaj trovu: [Kolektoj en ĉi sekcio](#)

Pli suben al:



[Esperanta numismatiko \[2014- \]](#)

[Organo de Esperanto Numismatika Asocio](#)

Ana Manero

Biblioteko Juan Régulo Pérez

www.esperanto.es/biblioteko

biblioteko@esperanto.es

Ni tutkore dankas Ana Manero-n pro ŝia iniciativo.